

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj » julio-septembro 2012

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Verda komencigo

Bona maniero per kiu komencigi Esperanto-bulteno estas per io verda, ĉu ne? Fakte, mi tion faras—per bultenero pri arboj.

Ofte ni pensas ke oni mezuras la grandecon aŭ malgrandecon de arbaro per la vasteco de la tereno kiun ĝi okupas. Tamen, artikolo en Discover-magazino (Usono) klarigas ke oni mezuras arbaron per vasteco KAJ denseco.

Sesdek-ok-landa studado de arbaroj indikas ke ekde 1990, arbaro-vasteco malpligrandiĝis en Sudameriko kaj Afriko, restis same en Usono, kaj pligrandiĝis en Eŭropo. Arbaro-denseco pliintensigis ĉie krom Azio; tie, arbaro-detruado en Indonezio tordis la pozitivajn regionajn statistikojn. La pliintencecon de arbaro-denseco oni atribuas al pli bona administrado.

La artikolo pritemas karbono-flankenmetado, ne indiĝenaj popoloj; pro tio, la signifo(j) de la vorto “administrado” atentindas. Ĉu oni same administras por pli intense flankenmeti karbonon, aŭ por konservi la tradiciajn terenojn de indiĝenaj popolo, kun la tieaj plantoj, bestoj, kaj akvo-fontoj kiuj profunde rilatas al la kulturo de la indiĝena popolo? Aŭ ĉu iam ekzistos larĝe uzebla maniero atingi ambaŭ celojn?

(“Forests Stage a Comeback,” [Arbaroj Ekreviviĝas], Discover-revuo, januaro 2012.)

Malnova kaj nova....

Gravega temo por indiĝena gento estas la elekto de kultivindaj plantoj. Dum antaŭnelongaj jaroj, la registaroj de pluraj disvolviĝantaj landoj kreis agrikulturajn programojn per kiuj indiĝenaj gentoj kultivis eksporto-cele. Sed ofte la indiĝenaj gentoj trovis ke tiuj programoj ne liveris la promesitajn ekonomiajn rezultojn. Okazas pli ol antaŭe vetero-ŝanĝoj, kaj internaciaj merkatoj por natur-produktoj ofte estas neprognozeblaj. La rezulto por indiĝenoj kiuj celis ekonomian pliboniĝon ofte estis malriĉeco. Krom tiu problemo, okazis malapero de tradiciaj plantoj kiujn la gentoj uzis kiel eroj de siaj tradiciaj vivoj, kaj kiuj jam delonge adaptis sin al la klimato kaj geografio de la tradiciaj terenoj de la gentoj.

Laŭ artikolo en la informilo Oxfam Exchange (printempo 2012), kelkaj indiĝenaj gentoj nun pripensas plu la decidon produkti internacie celitajn plantojn, kaj anstataŭe celas reiri al la tradiciaj plantoj kiuj rekte liveras al ili tradiciajn manĝaĵojn kaj medikamentojn.

Gravaj en la ekpliiĝo de tradiciaj agrikulturaj produktoj estas la virinoj de la indiĝenaj gentoj kiuj havas fortajn agrikulturajn historiojn. Oni rimarkas en la tiu-tema artikolo ("We Can't Ignore Who We Are" [Ni Ne Povas Malatenti Tiujn, Kiuj Ni Estas]) ke dum la viroj kultivas la internacie celitajn plantojn, ofte en lokoj makproksimaj al la familiaj loĝejoj, la virinoj nun kultivas la tradiciajn plantojn en kultivejoj apud la domoj, kaj tiel (laŭeble) daŭrigas la tradician familian vivon. Oxfam utiligis la daŭran ĉeeston de la virinoj sur la tradiciaj terenoj por organizi planado-sesiojn per kiuj la virinoj informis pri siaj deziroj (ekzemple, komenci bredi gekokojn, kaj vendi la produktojn de siaj ĝardenoj) aŭ pripensis kiel uzi siajn malmultajn rimedojn (ekzemple, grupe aĉeti semojn, kundividi la uzadon de la malmultaj iloj kiujn ili posedas, kaj kontakti virinojn en aliaj tradiciaj komunumoj por interŝanĝi semojn kaj kunkontakti eblajn aĉetantojn de la plantoj kiujn ili kultivas.). La organizoj AIDSEP (Asociación Interétnica Desarrollo de la Selva Peruana [Asocio Interetna por la Disvolviĝo de la Perua Arbaro]) kaj Oxfam kunlaboras kun la virina organizo kiu revivigas la laboron pri la tradiciaj plantoj por ebligi la aĉadon de bezonataj semoj kaj iloj. Gravas rimarki ke kiam indiĝeninoj organizas sin por fari ĝardenojn kaj celo-grupojn, ankaŭ ili povas komenci pripensi denove siajn rolojn en siaj kulturoj, siaj regionoj kaj eĉ en siaj landoj kiel plenaj partoprenantoj en decidoj kaj planoj. Tiel la virinoj kaj ilaj familioj kaj vilaĝoj povas ne nur transvivi kiel kulturaj arkaikaĵoj, sed funkcii kiel eroj de modernaj ŝtatoj.

El la pasinteco, en la estontecon

En la printempa (2012) numero de la usona revuo Tribal College Journal [Gazeto de Tribaj Kolegioj], aperis artikolo pri (s-ro) Don Moccasin, ano de la lakota gento de Usono. Mi mencias la artikolon ĉar ĝi estas bonvena kontrasto al la historioj de lingvo-projektoj de aliaj tempoj kaj lokoj.

Certe, pluraj el ni jam legis historiojn de lingvo-savaj projektoj je kiuj unu aŭ du lingvistoj aŭ antropologistoj aliris vilaĝon kie restas du maljunuloj kiuj ankoraŭ parolis la celitan indiĝenan lingvon. De tiuj du maljunuloj, la fakuloj penis lerni la historion, lingvon, kaj kulturon de gento. La aktuala situacio de la lakota lingvo feliĉe malsimilas tiun modelon.

Don Moccasin (1948-2009) ne nur parolis la lakotan, li faris videobendojn de aliaj homoj kiuj parolis ĝin kaj kiuj volonte parolis pri siaj vivo-travivaĵoj, familioj, komunumoj, kaj infanedukaj praktikoj.

Post la videobendigo de la parolantoj venis la digitigado, la pretigado de la videobendoj por videbligado / aŭdebligado por uzantoj de komputeroj. La tria, aktuala fazo estas la tradukado en la anglan de la komentoj. Tiun elspezigan laboradon oni faras helpe de akademiaj donacioj.

La feliĉeco de la afero ne haltas tie! La projekto instigas plurgeneracian kunlaboradon: pli junaj homoj surbendigas la komentojn de la pliaĝuloj; la pliaĝuloj

gvidas la la traduklaboradon de la plijunuloj, kaj la plijunuloj digitigas la tutaĵon por ke ĝi povu aperi sur komputerekranoj.

Rimarkindas ke pluraj personoj el la lakota komunumo nun interesiĝas pri lingvaj (ortografiaj, legokapabligaj) kaj lingvoprotektaj aferoj, kaj pri surbendiga kaj digitiga teknologioj, kiujn kelkaj el la pliaĝuloj nun uzas.

Per siaj profundaj intereso kaj aktivismo, Don Moccasin kreis lingvoprojekton kiu atingas samtempe la pasintecon kaj la estontecon, kaj kiu tiel pliriĉigas la homan kulturon.

Ĉerpaĵo el enfokusigilo verkita de (s-ino) Penny [Peni] Vos, novzelanda ano de PIP

“Dum almenaŭ du generacioj ni spertos la provokon de la revivigo de endanĝerigitaj lingvoj—dum multe pli da generacioj, se ni sukcesos eviti lingvoformortojn.

“Ni povos certigi ke estos sufiĉaj homoj kiuj forte interesiĝos pri tiu demando, kaj kiuj havas la bezonatajn lertecojn, se ni ŝanĝos kiel ni prezentos edukadon pri lingvoj en frua edukado.

“Aktuale, ni ofertas al infanoj aŭ nenion aŭ nesufiĉan studadon pri ekonomie potenca lingvo. Tio instruas al ili tio, ke lingvoj ne estas por ili alloga temo.

“Kontraŭe, ni povus oferti al ili ŝancon esti plurkulturaj kaj plurlingvaj en iliaj elementaj lernejoj, plene dulingvaj—kun amikoj ĉirkaŭ la mondo kiuj parolas lingvojn krom la anglan, ĉu ekonomie potencajn aŭ ne.”

Ĉerpaĵo el deklaro okaze de “Rio+20,” farita de la Universala Esperanto-Asocio pri daŭrigebla komunikado kaj lingvaj rajtoj

“La estonteco kiun ni deziras,”

“Nova vojo al daŭrigebla evoluo,”

“Kion vi sugestas por homoj en la jaro 2030?”

Per tiuj demandoj Unuiĝintaj Nacioj instigas la civilan socion al konkretaj proponoj!

“Nia organizaĵo, Universala Esperanto-Asocio (UEA), okupiĝas pri la tutmonda lingva politiko ene de la koncepto de “verda ekonomio,” la universala rajto je egaleca komunikado kaj protekto de lingva kaj kultura diverseco.

“Ĉar UNESKO oficiale proklamas ke lingvoj ludas strategian rolon en la forigo de ekstrema malriĉeco kaj ke lingvoj fakte estas esencaj por la identeco de la individuo—krom strategia socia faktoro—nia organizaĵo UEA, konsulta partnero de UNESKO en oficialaj rilatoj kun UN agadas aktive rilate la respekton de lingvaj rajtoj.

“Pro la tutmonde disvastiĝanta diskriminacio, ĝi pledas por lingvaj kaj kulturaj rajtoj, proponante la homan emancipiĝon kaj daŭripovan solvon por efika komunikado tra la konkretigo de la proponoj deklaritaj de UNESKO por dua neŭtrala lingvo por ĉiuj.

“UEA esperas de la konferenco Rio+20 klaran kondamnon de la nuna lingva diskriminacio kaj de la kultura hegemonio de grandaj popoloj sur la malgrandaj.

“La lingvoj havas certan gravecon por atingi la ses celojn de “Edukado por Ĉiuj,” proklamita de UNESKO. La vasta uzado de la internacia lingvo esperanto kiel dua lingvo estos imanente daŭripova pro sia ekonomia kaj politika neŭtraleco, sia facileco de lernado kaj respekto por etnaj lingvoj en edukaj sistemoj tutmonde.”

Kio estas “quilombo” [elp. kilombo]?

Tereno-perdo estas grava problemo por indiĝenaj gentoj en diversaj lokoj; perdiĝas tiel la ekonomia bazo de la vivmanero de la gento kaj gravaj eroj de ilia kultura kaj religia vivo. Se indiĝenoj iras al urbo por provi fari novan vivon, ili trovas sin en malsanaj, eĉ danĝeraj lokoj, sen bezonataj metioj por vivoperlaborado. Pro pluraj, malinstigaj kialoj, do, mi foje legas pri terenoperdoj kaj lamentas.

Artikolo en la internacia magazino National Geographic (aprilo 2012) pri “quilombo”-j instigis min dum ĝi prezentis al mi la demandon kiun mi faris artikolo-komence: “Kio estas ‘quilombo’?”

Dum la erao de la sklaveco en Brazilo, pluraj sklavoj eskapis kaj formis vilaĝojn kiuj nomiĝis “quilombos”. Dum multaj jaroj, tiuj vilaĝoj estis preskaŭ nekonataj eroj de brazilaj historio kaj kulturo. Tamen, la favoraj naturaj situacioj de la vilaĝoj (ekzemple, apud rivero) pli kaj pli allogis komercajn esploristojn. La ofta rezulto de tio estis ke la “kilomb-anoj,” kiuj kompreneble ne posedis oficialajn dokumentojn rilate siajn terenojn, devis foriri dum aliaj personoj starigis bienegon aŭ similaĵon.

Dum la prezidenteco de Luiz Inacio Lula da Silva, oni forte subtenis la leĝajn rajtojn de la loĝantoj ĉe kilomboj. La loĝantoj ricevis posed-rajtojn kaj posed-aktojn kiuj estis defendeblaj en tribunaloj. Krome, loĝantoj de kilomboj nun povas ricevi bazajn sanoservojn per riverboatoj—kaj sur la samaj boatoj ankaŭ laboras frizistoj!

Estas interese ke loĝantoj de la kilomboj retenas kelkajn ilojn kaj komportmanierojn afrikajn: grenopistilojn, fiŝkaptilojn, kaj religiajn konceptojn, kaj ke ankaŭ ili neformale lernis dum jarcentoj kiel produktigi la amerikajn terenojn kiujn ili kaŝe okupadis. Iom amuza ekzemplo de tio lernado estas tio, ke ili plantis fruktarbojn por altiri la frukto-manĝajn fiŝojn (jes, tiajn) kiuj kapablis naĝi en hortojn dum sezonaj inundoj. En tre malmultaj landoj oni iras al fruktarbaro por kapti fiŝojn!

La fama bovo

Ne eblas prezenti informojn pri kampara Brazilo sen mencii folkloran teatraĵon de tiu lando kiu nomiĝas “Bumba Meu Boi,” aŭ “Batu Mian Bovon”. Interesa afero pri la teatraĵo estas tio, ke inter ĝiaj roluloj estas riĉuloj, malriĉuloj, indiĝenoj kaj eĉ sanktulo .

La baza intrigo de Bumba-Meu-Boi pritraktas riĉan bieniston kiu donas bovon al sia filino. La zorgadon de la bovo li komisias al malriĉa laboristo. Tiu viro intencas bone zorgi la beston, sed lia edzino, kiu estas graveda, ege deziras manĝi la langon de la bovo, kaj pro tio, la laboristo mortigas ĝin. Kiam la bienisto ekscias pri la mortigo de la bovo, li deziras puni la laboriston, sed tiu eskapas.

Por kapti la laboriston, la bienisto utiligas la arbarosciojn de kelkaj indianoj, kiuj kaptas la laboriston kaj venigas lin al la bienisto. Kontraŭ la morto de la bovo, la

bienisto postulas la morton de la laboristo. Sankta Johano la Baptisto aperas dumsonĝe al la bienisto por averti al li ke li ne mortigu la laboriston, kaj la bienisto cedas pri sia antaŭa plano. Reciproke, la laboristo kaj sia edzino sensukcese penas revivigi la bovon, sed nur la indianaj ŝamanoj povas fari tion per la uzado de la tamburbatado—la “bumba” (batu) de la titolo de la teatraĵo. (Do, “bumba / batu” ne rilatas al batado de besto, sed pri la uzado de la tamburoritmio; per ĝi la ŝamanoj atingas la spiritomondon.) Indas rimarki ke en ĉi tiu sitacio, kristana sanktulo kaj spiritoj atingablaj de ŝamanoj kunlaboras por revivigi la bovon kaj pardonigi la laboriston.) Kiam la bovo reviviĝas, la bienisto plene pardonas la laboriston, la ŝamanoj reiras al la arbarego, kaj la teatraĵo finiĝas.

Bumba-Meu-Boi havas fortan identigon kun Brazilo, kaj montras al la mondo kiaj estis aŭ estas la vivoj de tereno-laboristoj de tiu lando. En la prezentado de la teatraĵo, ofte brilas la muziko kaj la festivalecaj kostumoj pro kiuj Brazilo monde famas.

(Fontoj: diversaj paĝaroj ĉe la Interreto kaj personaj scioj.)

Pulotu fa’u—la poetoj de Tongo

Mi havis la bonŝancon trovi monografion verkitan pri la poezio de Tongo, kaj jene mi prezentas kelkajn ideojn el ĝi. La verkisto estas Eric B. Shumway de Universitato Brigham Young de Havajo, Usono. Shumway kvarfoje vojaĝis al Tongo por studi la temaron.

La tonga vorto “faiva” signifas “present-artisto,” precipe poeto, muzikisto, kaj dancisto. Ŝajnas ke en tonga kulturo, poemo ofte akiras akompanan melodion kaj dancon.

Aparte interesa temo de Shumway estas tio, ke celo de la tonga prezentartoj estas “pligrandigi kaj glori” la reĝan familion kaj la nobelaron. La libera elekto de poeziaj temoj kaj pritraktoj kiu estas kutima en multaj landoj maltroviĝas en Tongo, kie la tradicia poeto estas laŭdanto.

Kvankam la poemoceloj kaj poemostrukturoj de tongaj verkistoj estas plejparte tradiciaj, oni rimarkas ke la vortostoko estas sufiĉe internaciigita; multaj neologismoj ŝajnas esti derivaĵoj de la angla, sed ankaŭ sufiĉe internaciaj. Ekzemploj:

Tonga Angla Esperanto

lose rose rozo

taimi time tempo

himi hymn himno

palataisi paradise paradizo

univesi universe universo

Tamen, talenta kaj taŭga poeto ne uzas neologismojn tro nekutimajn.

Aliflanke, ekzistas pluraj reguloj pri vortoj kiujn oni rajtas aŭ ne rajtas uzi.rilate la

reĝfamilion. Ekzemple, oni rajtas kompari reĝfamilianojn kun rozoj. Kial? Laŭ la rigida hierarkio de floroj en tonga poezio, la rango de la rozo estas alta, kaj pro tio, taŭga por rilati al tiu altestimata familio. Poetoj zorge (sed, aŭdantoj esperas, originale) uzas tiujn ligilojn inter reĝaj personoj kaj naturaĵoj kaj lokoj por krei na "heliaki," kaŝvortojn kaj kaŝfrazojn kiuj nerekte alparolas aŭ priparolas anojn de la reĝfamilio. Ekzemple, por la grava kaj fama tonga reĝino Salote, poetoj uzas la kaŝnomon "la virino de la pinarba vojo".

Alia forta influo en tonga poezio estas la konkursoj inter poetoj. Tradiciaj poezi-prezentadoj enhavas rektajn konkursojn inter ĉeestantaj poetoj, kies spritaj respondaĵoj estas gravaj eroj de la poezia travivaĵo por tonganoj.

Ĉie en la mondo aŭdiĝas poemoj kaj kantoj. Pro tio, Esperanto daŭre estu ponto inter lingvoj kaj kulturoj, instigilo por interkompreno kaj interĝuado.

Avoj kaj praavoj

Ĉu "Mi estas " au "Mi nomiĝas"?

Mia nomo interrespondas al mortinta blankulino.

Kiel ĝi rilatas al mi?

Tion mi ne scias. Josephine [Jozefa]. Ĝi ne taŭgas por mi.

Ĝi ne havas signifon

Sed mi estas signifo, signifo je ridado.

Kiel agloplumo per kiu oni frapetas
benocele la korpon de infaneto.

La infaneto ridas.

Mi estas signifo, signifo je forteco

Kiel agloplumo per kiu oni frapetas
benocele la korpon de mia avo.

Mia avo, kiu estas batalanto.

Mi estas signifo, signifo de mildeco

Kiel agloplumo per kiu oni frapetas
benocele la korpon de mia partino.

Mia patrino heroino.

Mi estas signifo, signifo de hau'tmakulo

Kiel agloplumo per kiu oni frapetas

benocele mian korpon.

Mia nomo Makuligita Plumo.

Ne nur mia nomo, sed kiu mi estas.

Josie Frye, aĝo: 17, gento: Tohono O'odam [antaŭe Papago], Usono

Sen Titolo

Hej! Mi prezentas mian pra-avon.

Li estas maljuna kaj saĝa kaj viro ĉipeva*

Li batalis je la grandaj militoj kaj vundiĝis.

Li amas min—sia nepo.

Pro tio mi esprimas deziron:

Vidi mian praavon.

Li dancas kun mi

kaj ni preĝas

unu kun la alia

Kaj ni portas niajn plumojn

por honori la aglojn

Kaj ni portas niajn florojn

por kuracokapablo kaj preĝoj

Do kundividu kun ni vian preĝon

Por ke ni preĝu kun vi.

(*nomo de lia gento, anglalingve "Chippeŭa")

James Haggarty, aĝo 12, gento: Chippeŭa, Usono

Finaj fum-ekblovetoj....

Jen finiĝas alia numero de La Kalumeto. Eble mi estas iom naiva, sed ankoraŭ mi petas ke vi, la legantoj, kontribuu al ĉi tiu bulteno. Kundividu kun aliaj legantoj pri tio, kio okazas en via propra lando, aŭ kie vi vojaĝis, aŭ simple io kiun vi legis....la dolor estas facile tolerebla kaj ne longe daŭras! Ankaŭ leteroj al la redaktoro bonvenas. Ni komuniku!

Erik Felker

por Projekto Indiĝenaj Popoloj

ejfelker@dslextrême.com